NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

NOVEMBRO/DECEMBRO 2008 **Nro. 76 (4/08)**



No olvides venir al Grupo a por la lotería de Navidad. Puede agotarse y ya sabes que **no reservamos**.

Así mismo, no olvides que el próximo sábado **13 de Diciembre** celebraremos la tradicional "fiesta de Zamenhof". Os esperamos a todos. Además, ese será el **último día de venta de lotería**.

LOKE ...

ZAMENHOFA FESTOTAGO.

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare ni renkontiĝos por celebri la naskiĝtagon de la fondinto de Esperanto. La kunveno estos la **sabaton 13-an de decembro, je la 7-a horo**. Estos mallonga parolado pri la ĉi-jara agado kaj la kutima interparolado ĉirkaŭ tablo plena de la manĝaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj; pano kaj trinkaĵoj estos aĉetitaj de la Grupo.

FIESTA DE ZAMENHOF.

Como es habitual en los grupos esperantistas de todo el mundo, también este año aprovecharemos la excusa del aniversario del nacimiento del creador del Esperanto para celebrar una pequeña fiesta. La reunión tendrá lugar el **sábado 13 de Diciembre, a las 7**. Habrá una pequeña charla sobre lo realizado en el año que se acaba y la habitual reunión alrededor de una mesa, bien provista con la comida aportada por los participantes. Como de costumbre, el pan y las bebidas corren por cuenta del Grupo.

KOTIZOJ 2008.

Se troviĝus ruĝa ikso maldekstre de tiu-ĉi alineo, tio signifas ke vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon por la jaro 2008. Se tiel estus, bv. efektivigi ĝin kiel eble plej rapide, ĉar ĝi estas bezonata por la ekzisto de nia E-rondo. Koran dankon. Kontonumero por pagoj troviĝas sur la unua paĝo.

CUOTAS 2008.

Si encuentras una "X" roja a la izquierda de esta línea, es porque todavía no has hecho efectiva tu cuota de socio correspondiente al presente año 2008. Si así fuera, te rogamos que nos la hagas llegar cuanto antes ya que, como sabes, es imprescindible para la existencia de este nuestro querido Grupo Esperantista. Muchas gracias. El número de la cuenta en que hacer los ingresos lo encontrarás en la primera página.

NOVA RET-ADRESO DE LA E-GRUPO.

Notu bone la novan ret-adreson de la Grupo de Bilbao:

esperantobi@gmail.com

LOTERÍA DE NAVIDAD.

Ya está disponible la tradicional lotería de navidad, en billetes de 3,00 euros (2,50 de lotería más 0,50 de donativo al Grupo), totalmente escritos en Esperanto. El número de este año es el **57.980**.

El último día para comprar lotería en el Grupo será el sábado 13 de Diciembre y recordamos que, como siempre, no se hacen reservas, por lo que os animamos a acercaros por el Grupo cuanto antes y a ayudarnos en la venta de las papeletas.

NOVA E-KURSO.

Teodoro Ibáñez gvidas E-kurson por komencantoj en la ejo de la "Ruĝa Kruco", en Bilbao. Per prelego okazinta la 2-an de oktobro, sub la titolo "Esperanto: la bezono de internacia lingvo", li sukcesis arigi kelkajn homojn, kiuj interesiĝis pri nia lingvo.

Alie, ne eblis organizi la anoncitan kurson en nia sidejo pro manko de partoprenantoj. Nur interesiĝis du homoj, el kiuj fine restis nur unu. Ĉio-ĉi spite de propagandkampanjo en la diversaj amaskomunikiloj de nia provinco.

Samtempe, kiel jam antaŭanoncite, ĉi-lernojaro ne okazos la kurso en la Vaska Universitato. Temas pri administraj iom absurdaj kialoj.

INTERVJUO EN RADIO.

La 24-an de oktobro, la Sekretario de nia Grupo, Jesús M. García, estis intervjuata de du ĵurnalistoj en "Radio Popular de Bilbao". La intervjuon oni faris per telefono kaj estis iom nekutima, ĉar la demandoj enhavis ofte ŝercoj, vortoj kun duobla senco aŭ malseriozaĵoj; tamen, interesa ĉar permesis malkovri al aŭskultantoj diversajn aspektojn de la Esperanta lingvo.

GALERIO DE PREZIDANTOJ.

Laŭlonge de la muro de la enirkoridoro de nia Grupejo, ni pendigis portretojn de ĉiuj prezidantoj de la Grupo (de Teodoro Elizondo, la unua, ĝis José Luis Bringas, la nuna). Per tio, ĉiuj el vi povas bilde spekti parton de la 100-jara historio de la E-Grupo de Bilbao.

Tre feliĉan kaj plensukcesan novan jaron 2009 ni deziras al vi ĉiuj nome de la E-Grupo de Bilbao.

DEĴORADO ĈE LA HEF-Oficejo.

La HEF-oficejo havas novan horaron:

- **De lundo ĝis vendredo: matene de 10,00 ĝis 12,00** (deĵoras Mirjam).
- **Sabate: de 11,00 ĥis 13,00** (deĵoras Miguel).

Por la adreso, telefonnumero, ktp. vidu: www.esperanto.es

(Pedro Hernández (Vicprezidanto de HEF). 13/10/2008)

NOVA E-KURSO EN HISPANA UNIVERSITATO.

Mañana comienza un curso de esperanto en la Universidad de Valladolid impartido por el profesor Carlos García González. El curso es de 30 horas lectivas.
Legu: http://www.psc.uva.es/notas/notas_desplegadas.asp?id=3446

(El retejo "iberia-esperantistaro". 04/11/2008)

LA HISPANA NACIA LOTERIO RIFUZAS DEDIĈI BILETON AL ESPERANTO.

Bedaŭrinde, respondeculo de la Nacia Loterio informas min telefone ke ili ne akceptis por 2009 la desegnon de bileto kun la vizaĝo de Zamenhof. Samtempe, ili eĉ ne antaŭvidas sendi leteron al HEF kun klarigoj. Nun restas atendi la respondon pri poŝtmarko, kies demarŝoj faris Toño del Barrio ĉe la "Hispana Poŝto".

(Lupe Sanz-Bueno. 13/11/2008)

HISPANA KONGRESO 2008.

Kiel anoncite, la 68a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en la andaluza urbo Malago. Ankoraŭ ne estis publikigitaj la kompletaj informoj pri la evento en la retejo de HEF, sed en la sama loko oni promesas baldaŭan aperigon.

STATISTIKO DE UEA.

Malgraŭ ke la temo iom po iom estingiĝis, jen la promesitaj ciferoj pri la UEA-membraro kaj kelkaj ĝiaj statistikaj aspektoj. La resumo estis preparita laŭkomisie de la CO kaj la ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak.

El abundego de diversaj ciferoj mi elektis tiujn, kiuj ŝajnas esti pripensindaj.

(laŭ la stato por la 23-a de septembro 2008)

Por hodiaŭ UEA havas tutmonde 5562 membrojn, i.a. 4586 jarkotizantajn kaj 976 dumvivajn kaj honorajn membrojn.

La konsisto de la UEA-membraro tutmonde estas "vireca" – 63 % estas viroj. Da virinoj estas 32 %. Pri 5 % de la membroj la datumbazoj ne donas informon pri ilia sekso. Por simpleco eblas diri, ke du trionoj de UEA-membroj estas viroj kaj unu triono – virinoj.

Laŭkontinente kaj des pli laŭlande la bildo estas pli varia, sed ne radikale. Iom pli proksimas al ekvilibro la landoj de Orienta kaj Centra Eŭropo (54 % da viroj kaj 42 % da virinoj, la ceteraj ne estas difineblaj). Plej malekvilibra situacio estas en Afriko (77 % kaj 10 %).

Laŭaĝe la membraro disdividiĝas sekve:

473 (9 %) membroj, kiuj aĝas sub 31 jaroj
392 (7 %) membroj, kiuj aĝas inter 31 kaj 40 jaroj
667 (12 %) membroj, kiuj aĝas inter 41 kaj 50 jaroj
926 (17 %) membroj, kiuj aĝas inter 51 kaj 60 jaroj
1.053 (19 %) membroj, kiuj aĝas inter 61 kaj 70 jaroj
862 (15 %) membroj, kiuj aĝas inter 71 kaj 80 jaroj
495 (9 %) membroj, kiuj aĝas super 81 jaroj
685 (12 %) membroj, kies naskiĝdato ne estas konata

UK-partopreno kaj membrofluo
==========

En UK-2008 partoprenis 1488 (27 %) el la membroj.

En 2008 al UEA aliĝis 978 novaj membroj (18 % el la tuta membraro). En la sama 2008 1432 personoj el la pasintjara membraro ne renovigis la membrecon.

El la novaj membroj 363 personoj (37 % el ĉiuj novaj membroj) aliĝis al UK-2008.
El la nerealiĝintaj membroj 649 (45 % el entute) estis aliĝintaj alUK-2007.

(Andrej Grigorjevskij, A-komitatano kaj volontula respodeculo pri la retaj servoj de UEA . 23/09/2008)

Tricent mil poloj eksciis pri Esperanto.

Lumdisko kun la simpla titolo "Esperanto" aperis la 10-an de septembro kiel aldonajo en la grava pola tagjurnalo Gazeta Wyborcza kun la rekorda eldonkvanto de 364.000 ekzempleroj. Gi aperis en tuta eldono de la gazeto kiel senpaga kromajo, kaj la aperigon de la disko en gazeto financis la urbo Bjalistoko. La diskon kreis la organizajo E@I, kiu prizorgas ankau la projektojn lernu.net, komputeko.net kaj la DVD-disko "Esperanto elektronike". La disko estis kreita surbaze de mendo de urbo Bjalistoko.
(...) Legu pli ==> http://www.liberafolio.org/2008/gazetawyborcza/

(Germain Pirlot. 11/09/2008)

Firefox nun oficiale en Esperanto

Oficiala versio de la populara, libera retnaviga programo Firefox, foje nomata ankaŭ "Fajrovulpo", nun ekzistas ankaŭ en Esperanto.
La unua versio de la traduko estis publikigita antaŭ unu jaro, kaj tiam ĝi estis distribuata kiel aldonaĵo (vidu http://tradukado.esperanto.org.uy/), per kiu eblas kompletigi ajnalingvan version de Firefox. Por esperantigi la krozilon necesis unue havigi al si alilingvan version de Firefox kaj kromprogramon por ŝalti inter la diverslingvaj versioj de la krozilo.

Ekde la sekva versio de Firefox, Esperanto evidente eniros la oficialan liston de lingvoversioj, kaj la Esperanta traduko estos distribuata memstare. Tio grave simpligos la instaladon. Jam nun en la oficiala retejo de Firefox (vidu http://www.mozilla.com/en-US/firefox/all-beta.html) inter la diverslingvaj beta-versioj de Firefox 3.1 elŝuteblas ankaŭ la esperantlingva traduko.

La esperantan tradukon dum longa tempo prilaboris teamo gvidata de Eduardo Trápani el Urugvajo. La teamo havis densan kontakton kun alia projekto, la tradukado de la ampleksa libera programaro OpenOffice.org, kaj grandparte sukcesis kunordigi la du tradukojn, tiel ke oni uzas la samajn terminojn en ambaŭ. Helpis en tio ankaŭ la retejo de la Komputeko-projekto.

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 18/10/2008)

La oficiala paĝaro de Barak Obama esperante!!! Unuafoje en la historio!!!]

=ttp://my.barackobama.com/page/community/post/ESPERANTO/gGx9PW

(Pedro Hernández. 05/11/2008)

ESPERANTO-TELEVIDO EL BJALISTOKO, 13.

(http://itvc.pl)

Laŭ la tradicia diro, „13" devas esti malfeliĉa nombro: kaj tio tuŝis ankaŭ nian televidon: Niaj aparatoj ribelis, kaj tial la 13-a parto de nia televido estas spektebla iom pli malfrue. Pardonu! En ĝi vi vidos du diversajn urbojn:

Unue, ni gastis en Tykocin (Tyktin, Tikotin), tre malnova podlaĥia urbeto kun bele konservita domaro, kie okazis tradicia, juda festo de kabanoj – Sukot. Ni vizitis ankaŭ hebrean preĝejon kaj ekspozicion pri judaj grafikaĵoj.

La dua parto temas pri 100-jariĝo de la Esperanto-movado en pola ĉefurbo Varsovio, kiun ni iom hazarde partoprenis. La heredaĵo de la pioniroj vivas, kaj ni esperu, ke Esperanto varsovia kreskos.

VENONTAJ KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ.

06/08 dec. 2008. 34-a kataluna kongreso. Sabadell (Barcelono).
27 dec.2008/03 jan. 2009. Internacia festivalo. Düsseldorf (Germanio).
27 dec.2008/03 jan. 2009. Novjara Renkontiĝo. Frankfurt-Main (Germanio).
28 maj./03 jun. 2009. 8-a Eŭropa E-Kongreso kaj 86-a Germana E-Kongreso. Herzberg (Germanio), la Esperanta Urbo.
18/25 jul. 2009. 82-a kongreso de SAT. Milano (Italio).
25 jul./01 aŭg. 2009. Universala Kongreso. Bjalistoko (Pollando).
05/11 okt. 17-a Internacia E-Semajno de kulturo kaj turismo. "Costa Brava" (Katalunio).
Jul. 2010. Universala Kongreso. Havano (Kubo).

Kiel ĉiam, pliaj informojn kaj eventualajn kunvojaĝantojn vi trovos en nia E-Grupejo, do ne hezitu kaj demandu nin.



Sur la maldekstra foto aperas stratplato de la urbo Herzberg am Harz, sidejo de la venontjara kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio.

Ĝi estis oficiale deklarita "Esperanto-urbo", kio signifas ke ĉiuj stratindikiloj kaj oficialaj dokumentoj surhavas tradukon al Esperanto.

POEZIA ANGULO.

REVI PRI OLŜTINO.

Mi volus reeĉeesti en Olŝtino;
Aŭskulti, en l'gotika katedralo,
La eĥon de la heroa analo
Pri sia kruckavalira destino.

Rigardi kiel la brika kastelo,
Enfermiĝita en la historio,
Brilas pro arda, hela sunradio
Kiel la plej ruĝrubena juvelo.

Kiel vitra serpento la rivero,
Rampas zigzage tra l'urbo, lekante
Tipajn reliefojn kaj reflektante
Mirindaĵojn de ĥimera apero.

Mia revado dancas kun la vento
Tra arabeskaj filigrano-stratoj
De mezepokaj, el ŝtonaj brokatoj
Faritaj, kiel urba monumento.

Pro ĉio ĉi, estos mia destino,
Ĉeesti al l'agrabla kunestado
Pere de l'esperantista movado,
Je somer-renkontiĝo en Olŝtino.

(Alberto García Orive, Bilbao).

MIA HISTORIO PERDIĜAS INTER LA HOMAMASO.

Kiam mi eliras al la torento
De la fluanta homamaso, miaj
Paŝoj perdiĝas inter la aliaj
Paŝoj forvišitaj de la vento.

Kaj sen ili, sur la strata cemento,
Mi trairas sola: sen historiaj
Momentoj; lante sub la sunradiaj
Lumoj, paŝo post paŝo, en silento.

Mi iras farante vojon, paŝante
La paŝadon eterne. Kaj mistere
Ĉiuj la paŝosignaĵoj konstante

Solviĝas en la neniaĵo. Vere
El ĉi tiu vivo ĉiuinstante
Dissolviĝas kiel la paŝoj tere.

(Alberto García Orive, Bilbao).